

De la 20-a ĝis la 25-a de februaro en la bazejo “Ĉajka” apud Ĉeboksari okazis la 20-a festivalo “Esperanto – Lingvo Arta”. En ĝi partoprenis 75 personoj el 12 loĝlokoj de Rusio.

Malgraŭ sia ronda numero, la aranĝo pasis sen ekstraj ceremonioj kaj laŭtaj vortoj, kio klarigeblas per tio, ke dum lastaj jaroj EoLA ne tro prosperas, kaj la nura fakto, ke ĝi tamen okazis vicfoje, jam estas sukceso. Ankaŭ ĉi-lastata aranĝo montris, ke nunaj festivaloj ne estas la plej gloraj en la historio de EoLA. Preskaŭ ĉiuj organizaj aferoj, privataj paroloj kaj eĉ parto de la programo pasis ruslingve. El la nedistraj E-temaj programeroj menciindas preskaŭ nur la prelego de A.Melnikov. Neniuj artaj konkursoj kaj premiadoj okazis, ili apenaŭ povus sukcesi, eĉ se estus planitaj. Mi eĉ ne memoras jam, kiam lastfoje dum EoLA aperis nova talenta artisto.

Tamen ne ĉio estas tiom malĝoja eĉ en la nunaj, krizaj por EoLA, jaroj. Ne malaperis la tradicia por niaj aranĝoj etoso, pro kiu dekoj da samideanoj ĉiujare strebas trovi ajnan eblon kaj veni por kelkaj tagoj al Esperantujo.

Agrable surprizis nova generacio de ĉeboksaraj esperantistoj (mi jam ne povas ĝuste kalkuli, kiom da E-generacioj aperis en tiu glora urbo), kiuj sukcesis en deca nivelo ĉion prepari, organizi kaj okazigi (sola bedaŭrindaĵo estas, ke ilia laborlingvo ofte estis la rusa). Tre bela estis ilia inaŭgura spektakleto. Impresis kroninta la festivalon pompa Balo. Multis diversaj konkursoj, metiejoj, ekskursoj, surprizoj.

Menciindas ankaŭ E-koncertoj de aliurbaj gastoj – Lena Melnikova (Rostov-Don), Griša Arosev (Moskvo) kaj Maŝa Kočetkova (Moskvo). La lastaj du artistoj pro diversaj kaŭzoj dum kelkaj jaroj ne koncertis en E-aranĝoj. Sed evidentiĝis, ke ilia majstreco nenien malaperis; iliaj novaj kantoj ne malpli bonas, ol la la antaŭaj; ilia plenumnivelo eĉ plialtiĝis; iliaj koncertoj denove portas nur plezuron por la kantoŝatantoj.

Aldonajn impresojn pri la okazinta apud Ĉeboksari EoLA donos al la legantoj la fotoj ĉi tie kaj en kovrilpaĝoj de la numero.

Garik Kokolija
(Moskvo)



la partoprenantinoj de la inaŭgura spektakleto



Mikaelo Bronŝtejn

Vica vintra vojaĝo

1.

Tiun vojaĝon mi nomas vica ne nur pro tio, ke jam la sesan fojon ĉe la jarfino mi forveturis el mia hejmo en Esperantujon, sed ankaŭ pro tio, ke, samkiel ĉiu el la antaŭaj, tiu ĉi estis zorgeme kaj longtempe planata/preparata. Alie ne eblas, ĉar ordinare mi iras eksterlanden ne por ripozi, sed por esperantumi. Mi iom malkovru al vi mian kuirmetodon.

Do ankaŭ ĉi-foje mi komencis en februaro 2007 per aliĝo al IF. Pli precize – la mastro de la Internacia Festivalo (IF), okazanta jam la 24-an fojon dum jarŝanĝo, s-ro Hans-Dieter Platz (HDP) invitis min ankaŭ al IF-24, konsiderante, ke mi havos certajn taskojn. Krom tio mi ricevis inviton de Dana Esperanto-Asocio por turneo, ligita al la 100-jara jubileo de Kopenhaga E-Klubo. Sekve, ekde marto, ne ĉiutage, sed pli-malpli regule, mi devis okupiĝi pri miaj programoj.

Malgraŭ ke plejparto el inter menditaj prelegoj estas preta kaj multfoje-multloke prezentita, ĉiam oni trovas ion por ŝanĝi en la teksto, aldoni freŝakiritajn ilustraĵojn, reipensi diversajn nuancojn. Kompreneble, novajn temojn necesas prepari de nula elirpunkto. Sed prelegtaĵlado estas ne tro malfacila laboro. Multe pli da tempo kaj pensado postulas scenaroj de distraĵ aranĝoj, gvidotaj de mi; eĉ por la interkonaj IF-vesperoj, kiujn mi gvidis kvarfoje dum antaŭaj IF-oj, ĉiufroje mi bezonas absolute novan kaj freŝan scenaron. Donacoj – jes, kelkaj aĉeteblas (vodko, bombonoj, pupetoj), sed la ĉefa donaco, kiun oni atendis de mi, estas almenaŭ du-tri novaj kantoj. Ankaŭ tiujn mi devas iel-tiel verki. Restas teknikaj demandoj – asekuraĉeto, vizricevo (trifoja veturado Peterburgon, do tri tagoj perditaj), elekto de trafikrimedo. Pri la lasta permesu konsili al vi: se oni atente fosas en la Reto, oni certe trovas flugojn, kiuj kostas eĉ malpli ol busvojaĝo! Spertinta en la antaŭaj jaroj kelkajn turmentajn 50-horajn busvojaĝojn kun humiligaj traserĉoj ĉe belorusa-pola landlimo, ĉi-foje mi estis absolute feliĉa, ĉar trovis kaj tuj aĉetis flugbiletojn por ĉiuj miaj kvar flugoj. Jen ekzemplo: la lasta bileto – de Berlino ĝis Peterburgo – kostis nur 49 eŭrojn!

Kaj venis decembro 2007. Por decembro restas du taskoj: paki la aĵojn (trise-majna laboro nerapida – por nenion forgesi), kaj sendi tradicion novjaraĵ gratulon al ĉiuj geamikoj en la mondo. Jen ĝi estas ankaŭ por vi:

*Pasintnovjaraj abioj forbrulis
en la stampedo de l' tempa rutin'.*



*Dekdu monatojn horloĝ' forkalkulis
 kaj altiktakis al nova jarfin'.*
*Kaj renaskiĝas fenikse en stratoj
 odoro tenta de la konifer',
 kaj festaj datoj, jam tre atendataj,
 triumfe paŝas de nun laŭ la Ter'.*
*Do en la neĝa rusia provinco
 mi ŝaltu lumojn sur mia abi' –
 kaj vi ekvidos, ke brilas tra l' vintro
 la bondeziroj plej koraj por vi.*

Tiu estis farita la 25-an de decembro, samtage dissendita, kaj la 26-an posttag-meze mi bonŝance forflugis el Pulkovo al Düsseldorf – la urbo de la 24-a IF.

2.

Eble estus pli korekte elparoli la literon “ü” ne kiel molan “u”, sed kiel “j”. Tiel faras spertuloj (ekz. por Günter Grass), sed mi ne povas kutimiĝi al tio. Ne gravas tamen la elparolo. Je dispono de pli ol 160 partoprenintoj el 20 landoj estis grandega, tre bela, suninundita urbo ĉe Rejno kun siaj



dum la ekskurso

monumentoj kaj bierejoj, logaj-delogaj butikoj kaj memorlokoj de Heinrich Heine, ankaŭ kun serpentege longa vico ĉiutaga al la Arta muzeo, kie tiutempe estis funkcia la fama ekspozicio “Bonjour Russland”, poste formigrinta al Londono. Je plena dispono de la IF-anoj estis, certe, la IF-ejo – tre impona junulara gastejo tuj ĉe la riverbordo kaj kvin minutojn for de la urbocentro. Se diri la tutan veron – la gastejo ne estis finkonstruita al la komenco de IF, malgraŭ promeso de la mastrino. Pro tio, ĉe loĝkondiĉoj tute perfektaj, por ĉiuj internaj programeroj ni havis nur du salonojn – grandan manĝejon kaj etan salonon en keletaĝo, do ekz. la Libroservo instaligis kaj funkciis en koridoro de la sama keletaĝo. Cetere, tiu ĉefa malkomfortaĵo ne tro influis la kutiman etoson de la aranĝo, eĉ aldonis certan spicon al ĝi.

Rusiaj esperantistoj ne multis ĉi-foje, ĉar la fifama interna ambasadeja skandalo lasis sen vizoj preskaŭ ĉiujn, kiuj vizpetis ĉe la moskva konsulejo de Germanio. Iom savis la situacion dudekpersona grupo de ĉarmaj peterburganinoj,

alveninta du tagojn post la Interkona vespero. La ĉarmulinoj, malgraŭ absolute elementa lingvoscio, aktive partoprenis ĉiujn komunajn aranĝojn kaj bele ornamis la kutiman IF-anaron.

La kadra temo de ĉi-jara IF estis “Vojaĝoj”, do la partoprenantoj ricevis dekon da atentokaptaj prelegoj pri la temo, i.a. “Karavana vojaĝo tra Siberio” de Tatjana Loskutova (Rusio), “Tibeto – tegmento de la mondo” de Amri Wandel (Israelo), la mian – “Arto vojaĝi en Esperantujo” k.a. Eĉ pli vaste estis prezentitaj prelegoj alitemaj, sed ne malpli interesaj – pri ĉina astronomio brile rakontis Amri Wandel, pri abeloj – Rosa Ebel (Germanio), pri “Ipernity” – Paul Peeraerts (Belgio). Certe, mi aligu al la kadra temo ankaŭ la neforgeseblan tuttagan perbusan ekskurson laŭ Rejnvalo – spektadon de pitoreskaj riverbordoj kun dekoj da belegaj kasteloj, tagmanĝon en tradicia restoracio “Rheingold” (La oro de Rejno) kaj grimpadon sur la faman rokon de Lorelei. Ankaŭ kelkajn promenojn en Düsseldorf, gvidatajn de lokaj esperantistoj, kaj ekskursojn, okazintajn dum plilongigaj tagoj – al la fama vilaĝo Neandertal kun muzeo de homhistorio kaj al tre bela kastelo en apuda urbeto Krefeld.



dum la Silvestra balo

La vesperoj de IF estis tradicie imponaj. Krom la kutimaj Interkona vespero kaj lasttaga Internacia koncerto okazis brila biervespero, kie naturkuracisto Harald Schicke ne nur klarigis al la publiko ĉion pri bierproduktado, sed ankaŭ gustumigis dek bierspecojn, postulante pritakson de ĉiu en specialaj enketfolioj. Ne malpli brile

pasis la koncertoj de JoMo kaj de ensemble “Kajto”.

Kaj, certe, la Silvestra balo, malgraŭ iom nesufiĉa spaco, estis triumfe dancoplena, gajetosa kaj impresa – tio koncernas ankaŭ la pompan Silvestran bufedon.

Kutima nokta Knajpo logis la babilemulojn-trinkemulojn post la 23-a horo ĉiutage. Lertaj knajpistinoj Gražina Opulskiene kaj Maja Loskutova laboregis ŝvite ĝis la tria matene, estingante soifon de cent gorĝoj per teoj, kafoj, bieroj, vinoj ktp. Unu el la ĉefaj ĉiutagaj soifantoj estis ankaŭ mi, sed la lastnoktan soifestingon mi devis anstataŭigi per dormo, ĉar je la kvina matene min atendis flugo al Kopenhago.

3.

La 6-an de januaro Kopenhaga Esperanto-Klubo festis sian centjaran jubileon. La festo komenciĝis ekde mateno, kiam kelkaj esperantistoj vizitis la urban tombejon por meti vivan verdan stelon, lerte faritan el iu planto nekonata por mi, al la

tombo de Marie Schroeder. Tiu bela juna virino estis unu el fondintoj de la klubo en 1908 kaj aktivegis ĝis la subita forpaso en 1909. Loka televido filmis la eventon, ankaŭ la posttagmezan celebradon en tre impona salono de la Kulturdomo Nordvest. Pli ol 70 personoj partoprenis la festan tagmanĝon kun multaj salutparoloj kaj tostoj, poste okazis duparta koncerto. La unuan parton okupis laŭmerite aplaŭdata koruso “Tap-koret” kun esperantigitaj danaj kantoj, la duan akaparis mi kun la miaj.

Malgraŭ iom tro griza vetero (ĉu oni atendu alian de apudmara vintro?) mia ri-poŭtago la 7-an donis abundajn impresojn, ĉar ĝi pasis en Kopenhago, urbo nekonata por mi. Kun afabla ĉiĉeronino Ana mi spektis ŝanĝon de gardistaro ĉe la reĝa palaco. Bravajn uniformitojn kun ursofelaj ĉapoj antaŭis blovorkestro – Ana klarigis, ke tio okazas nur se la reĝino estas en la palaco.

Ĝenerale, ĉi tie, en Kopenhago, kaj en aliaj vizititaj urboj danoj parolis pri la reĝino kaj pri la tuta reĝfamilio estimplene kaj eĉ ame ne speciale por mi, eksterlandano, sed sincere,

pursente. Mi opinias, ke laŭmerite, ĉar nuntempe bonfarto de danoj estas elstara eĉ inter la plej bonfartaj landoj de EU. Cetere, Danio ne akceptis eŭron – eble pro tio la prezroj tie restas averaĝe pli modera ol alilande.

La famega Marvirineto estis sidanta en sia kutima loko – sur ŝtono ĉe golfo. Fonis iaj fumantaj tubegoj, uzinkonstruaĵoj – la fono tute nekonforma kaj malromantika. Sed arego da peterburganoj el tri busoj, starantaj apude, entuziasme interfotigis apud la laca Marvirineto.

– “Saluton, samurbanoj!” – “Ha, ĉi el kiu buso?” – “Mi – ne el buso, simple promenas.” – “Bonŝancas iu, ... tvoju matj!” – “Nu, certe”. Sekvis kasteloj, parkoj, monumentoj kaj tagmanĝo kun freŝa “Tuborg”-biero. Post la tagmanĝo ni trafis sub pluvneĝon, kiu faris plian vagadon tro malkomforta, do la ekskurso estis finita.

Kopenhago situas en Zelando, sed mi devis viziti ankaŭ Esperanto-klubojn en Jutlanda duoninsulo, do sekvantan duontagon mi pasigis entrajne. Ĉi-foje suna vetero ebligis al mi ĝui la pejzaĝojn ĝis norddana urbeto Aalborg. Tieaj esperantistoj elektis aŭdi pri Puŝkin. La temo estas kara por mi – mi zorgis fari ĝin kara por miaj aŭskultantoj. Ŝajnas ke ne sen sukceso. Sekvatage, post duhora trajnumo mi estis renkontita en Århus, per aŭto ekskursigita al ĉefaj vidindaĵoj, nutrita per la pladoj kutimaj por mi (ĉar en pola familio), kaj venigita en la klubon por rakonti pri la tohuvabohuo de rusaj festoj. La temo, kiun elektis klubanoj, estis gaja, do la tuta



kantas la ensemble “Kajto”

vespero iĝis ridplena kaj emociiga. Sekvis streĉa nokta aŭtumado kun avo Henriko al lia vilaĝa domo, kie mi ricevis ĉilian vinon kun sandviĉoj, amuzan babiladon, kaj fine – komfortan liton por refreŝiga dormo antaŭ starti reen, en Kopenhagon.

Tie – vespero feste ripoza kun esperantista kompanieto, i.a. kun mia eksa samurbano Aleksandro Kogan, jam dum pli ol dek jaroj loĝanta en Danio. Dum sekvantaj tri vesperoj – tri prelegoj diversteme kaj diversloke – en la juda societo, en la Esperanto-klubo kaj transponte, en la sveda Malmö. Krom la prelegoj – intervjuo por radio, trihora spektado de sinagoga diservo, vizito al la muzeo de Arto, promeneto ĉe la maro...

Ĉu jam fino? Ho ne! Aviadilo al Prago – al dutaga senzorga ripozo enhejme de mia ĉarma kunaŭtorino Elena Puĥova, poste trajno al Berlino por vespera kantado en junulara kompanio, kaj nur poste – trihora flugo al mia kutima Pulkovo.

Retrorigardante la vican vintran vojaĝon en Esperantujo, mi trovas ĝin sukcesa, ĉar mia publiko restis kontenta; ankaŭ mi estas kontenta kaj kore dankas ĉiujn engaĝitojn pro modela organizo de mia restado. La vojaĝimpresoj plenigis vican notlibreton por aperi post encerba fermentado verse, kante, rakonte aŭ por esti forgesitaj en plia galopado de la eventoj.

P.S.: Ne malgrava konsilo por uzontoj de etprezaj flugoj. Homoj, tie oni ne nutras enavie! Kunportu sandviĉojn aŭ pretiĝu al kelkhora fastado.

FENESTRO AL LA MONDO

“Parolas Kaliningrado! Saluton!” – per ĉi tiuj vortoj en Esperanto komenciĝas artikolo “Okno v mir” (Fenestro al la mondo), aperinta 25-an de marto en la tagĵurnalo “Kaliningradszkaja pravda”.

En ĉi tiu artikolo (subtitolita “Kaliningradaj esperantistoj venis en la ret-radion”) kaliningrada ĵurnalistino Irina Klimoviĉ klarigas, kio estas podkastado, kaj poste interparolas kun Halina Gorecka pri la kaliningrada Esperanto-podkasto. La legantoj ekscias pri la kreskanta populareco de la retaj sonprogramoj, pri la podkasto de “La Ondo de Esperanto”, kiu havas aŭskultantojn en kvindeko da landoj, pri la temoj de ĉi tiu podkasto. Halina respondas, interalie, ke alilandaj podaŭskultantoj precipe ŝatas tradukojn el Ĉeĥov, kiuj estas voĉlegataj en ĉiu literatura programero.

La artikolon, kiu aperis je la Tago de Kultur-aganto, garnas foto de Halina Gorecka antaŭ la mikrofono en la redakcio de “La Ondo de Esperanto” (fotis Aleksej Korĵenkov).

Probable, en la nuna Ruslando “Kaliningradszkaja pravda” estas la regiona ĵurnalo plej regule kaj objekte informanta pri Esperanto danke al Irina Klimoviĉ, kiu pasintjare ricevis honordiplomon de Kaliningrada Regiona Unuiĝo Esperantista (pli frue ĉi tiun diplomon ricevis Edward Kozyra, Povilas Jegorovas kaj Jaroslaw Czubinski).

La sonprogramoj de “La Ondo” estas aŭskulteblaj ĉe <<http://la-ondo.rpod.ru/>>. Oni povas aboni la podkastojn: <<http://la-ondo.rpod.ru/rss.xml>>.

(esperanto-rus-informoj)

D-ro hab. Aleksandr S. Melnikov, la estro de la fremdlingva katedro de la Rostova Agrikultur-maŝinkonstrua Akademio, ricevis honorfolion de la Rusia Ministerio de Klerigado kaj Scienco “Pro multjara kaj fruktodona agado por preparado de altkvalitaj fakuloj, signifaj sukcesoj en scienc-pedagogia kaj scienc-esplora agado kaj pro multjara kaj fruktodona laboro” (subskribis vicministro V.Fridlanov).

Ni notu, ke la scienc-esplora laboro de Aleksandr Sergejeviĉ estas preskaŭ ekskluzive koncentrita je esperantologio kaj interlingvistiko. En 1990 li defendis la 4-an en Sovetio “kandidatan” disertacion pri la principoj de lingvokonstruado kaj planlingva funkciado en la moderna interlingvistiko, en 2004 sekvis la unua en la mondo habilitacia disertaĵo pri la ligoj “Esperanto – kulturo – lingvo – lingva personeco”. Melnikov daŭre estas la sola rusia sciencisto, kiu habilitaciigis per interlingvistika studo.

Aleksandr Sergejeviĉ partoprenis en multaj sciencaj konferencoj, kadre de kiuj li elpaŝis pri interlingvistikaj temoj. Inter la lastaj – konferenco okazigita de la Akademio de la Itala Lingvo, AIS, Florenca Universitato kaj UEA (Florenco, Italio, 2006), kie d-ro Melnikov estis la sola reprezentanto de Rusio, Aŝmarinaj lekciadoj de la Ĉuvaŝa Universitato (Ĉeboksari, 2003-2006), Internacia Scienca Konferenco ĉe la Kazana Universitato (2007), Internacia konferenco pri la propedeŭtika valoro de E-o en Moskvo (2007) k.a.

Aleksandr Sergejeviĉ prelegis kaj lekciis pri interlingvistiko/esperantologio ĉe la Monaŝa Universitato (Aŭstralio), Interlingvistikaj Studoj ĉe la Poznana Universitato (Pollando), pluraj rusiaj universitatoj kaj superaj lernejoj. Gvide de la d-ro estis defenditaj 4 esperantologiaj diplomlaboroj. Pluraj studentoj verkis siajn jarajn kurslaboraĵojn. La listo de liaj esperantologiaj/interlingvistikaj artikoloj inkludas duoncenton da titoloj.

La aŭtoras plurajn popularajn librojn pri/en Esperanto:

1. *Specifaj kulturaj scioj de la esperantista kvazaŭetno kaj ilia reŝpeguliĝo en la koncerna lingv(aĵ)o.* 1992. Delonge elĉerpita.

2. *Portreto de ideo kun malordinaruloj anstataŭ la fono...* (populariga, pri Eo kaj la problemoj de internacia lingvo; en la rusa; eldonkvanto 2 mil ekz.). 1997. Ankoraŭ haveblas ĉe la Moskva E-Centro kaj la Libroservo de REU.



dum EoLA-20: Aleksandr Melnikov rakontas

3. *“Instruado sen turmentado!” La ĉefaj principoj de fremdlingva instruado...* 1999. (Egide de ILEI, ŝajne, restis 3 ekz. ĉe UEA; la cetero – disvendita).

4. *Lingvokulturologiaj aspektoj de internaciaj planlingvoj...* (habilitacia disertacio en la rusa; libroforme – 631 p.). Pri ĝi aperis favora recenzo surpaĝe de grava rusia lingvistika/filologia gazeto plume de renoma rusia lingvisto V.M.Alpatov (vicdirektoro de la Orientologia Instituto de la Rusia Scienc-Akademio, kiu, cetere, estis unu el la oficialaj ekspertoj de la disertacio). Ĉi tiu kaj la subaj titoloj aĉeteblas ĉe la supremenciitaj libroservoj.

5. *Esperanto por harfenduloj*. 2006 (unufoje en la rusa lingvo lernilo por progresantoj, cetere, verkita laŭ la principo “edutainment” – distro kaj instruo – kaj kun ampleksaj informoj pri la E-kulturo; eldonita la 1-a parto. Preskaŭ pretas kaj ĉi-jare devas aperi la dua parto. Entute estas konceptitaj 5 partoj kun la totala amplekso minimume 500 ĝis 1000 p.).

6. *Esperanto – lingvo de kulturo kaj personeco*. 2007 (surbaze de la dua disertacio, sed verkita leĝerforme; unu el la eseoj ricevis la 1-an premion – L.Minnaja – en Belartaj Konkursoj 2006; la libro estas eldonita ĉe la Eŭropa Jura Universitato “Justo” egide de la Poznana Universitato kaj rekomendita por la kursanoj de la Interlingvistikaj Studoj).

7. Estas preta por publikigo kaj baldaŭ aperos presite pli ol 220-paĝa studo *“Vortludoj kaj lingva komunikado en Esperanto: lingvaj premisoj, tipoj, specifeco kaj antologieto”*.

(esperanto-rus-informoj)

V.S.ŜADRIN (16.02.1913 – 05.02.2008)

Forpasis nia estimata samideano, esperantisto de 1928, Valerij Sergejeviĉ Ŝadrin. “Suna” homo, amikema, pacema, zorgema, senlaca propagandisto de Esperanto. Ĝis la fino de sia vivo li estis agema, vigla, korespondis kun la tuta mondo. Lia ĉiama bonhumoro vigligis kaj ĝojigis ankaŭ nin.

Kiel plimulto de unuaj esperantistoj, li tre atentis la kulturon de E-parolado: mem parolis klare, ne rapide, kompreneble. Kaj ĉiam li havis iun spritan anekdoton por rakonti al ni. Li ludis en niaj teatraĵoj, propagandis Esperanton en loka gazetaro, instruis koresponde, tradukis, partoprenis E-renkontiĝojn en nia lando. Vera internaciulo, li estis membro de IKEK, ankaŭ kunlaboris kun ties organo “Internaciisto”.

Kiam lin oni intervjuis en radio aŭ televido, li ĉiam substrekis, ke Esperanto malfermas fenestron en la mondon, faras la vivon pli riĉa, emocia, varia. Tia komunikema, ĉiam ridetanta, plena de fortoj kaj ideoj li restos en nia memoro.

Iam por la manskribita “Literatura almanako”, kiun eldonis E-klubo “Kontak-



to”, Valerij Sergejevič skribis siajn rememorojn, kiujn mi volus proponi al nia esperantistaro.

Marija Prilepskaja (Samara)

Miaj rememoroj pri la antaŭmilita E-movado

Mia patro ne estis esperantisto, sed li havis Unuan Libron (verdan libreton) de L.Zamenhof. La libreto ĉarmis kaj kaptis min tute. Do, en la jaro 1928 mi esperantistiĝis...

En nia urbo Samara tiam funkciis du kluboj esperantistaj: E-klubo de fervojistoj kaj E-klubo de vend-oficistoj. Mi estis membro de la fervojista E-klubo. La anaro de la klubo ankaŭ estis fervojista: maŝinistoj de lokomotivoj, telegrafistoj kaj oficistoj. Nur mi estis simpla lernanto de la 8-a klaso.

Kamarado Ŝeleznjakov, bela, bonstatura, kun granda barbo juna homo, estis prezidanto de la klubo. Sed oni ne nomis ĝin “klubo”, tio estis nur “rondeto de Esperanto”.

En la rondeto ni studis la lingvon kaj kun granda impresio eldonis murgazeton. Ni kantis ĥore Esperantajn kantojn, sed preferis nur revoluciajn. Ekzemple: “La Internacio”, “Karmanjolo” – kanto de francaj ribeluloj, kaj similaj.

Por praktiko en la lingvo ripoztage ni ekskursis en naturon. Niaj marŝoj estis ĝojaj, babilplenaj kaj amikecaj. Miaj plej bonaj amikoj estis: studentino-esperantistino Zoja Skvorcova kaj oficisto Matvijenko. Ni ĉiam, ĉie aperis triope kaj parolis esperantlingve.

Tiam la ĉefa slogano estis: “Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!” Ni atendis proletajn revoluciojn en aliaj landoj. En Germanio bone funkciis komunista partio kaj ĝia gvidanto Ernst Telman. Flamis la civitana milito en Hispanio.

Ni korespondis kun esperantistoj de multaj landoj kaj vere kredis, ke Esperanto estas bona rimedo por Unuiĝo de proletoj.

Ni ankaŭ havis la sloganon: “Esperanto estas lingvo de proletoj de la tuta mondo!”, kaj niaj leteroj estis plenaj de solidareco kun alilandaj junaj laboruloj.

Mi estis membro de SEU kaj havis verdan membrokarton. En la karto oni gluis kotizmarkojn. SEU-organizaĵo estis vigla, vasta kaj estimata. Oni eldonis multajn esperantaĵojn (libroj, gazetoj ktp.).

Mi havis specialan SEU-insignon – Verda stelo kun ruĝa ornamo. Insignon kun blanka kampo ni ne rajtis surhavi, ĉar ĝi estis burĝa (neproleta). Estis la slogano: “Ĉiu laboristo kaj kamparano posedu lingvon Esperanto!” Kaj oni studis kaj posedis, ĉar lernolibroj estis simplaj, aĉeteblaj, en multaj ĵurnaloj oni presis lecionojn de Esperanto. Esperanto kiel lingvo estis pli simpla, pli studebla ol nun.

Ni eĉ akceptis gastojn el eksterlando. Mi bone memoras nian germanan gaston – esperantiston el la urbo Leipzig. Li estis fervojisto kaj vojaĝis tra Soveta Unio per biciklo laŭ reloj de ŝtataj fervojoj. Iom strange, sed tio okazis. Lia biciklo havis tri radojn; du radoj estis grandaj kaj la tria estis malgranda (radeto). La grandaj radoj rulis laŭ la liva relo kaj la radeto rulis laŭ la dekstra relo de fervojo. “Diese

wichtigste Mechanismus”¹ funkciis bone kaj havis multajn grandajn nigrajn kestojn por produktoj kaj vojaĝ-objektoj. Kaj sur la kestoj estis blanka surskribo, ambaŭflanke: “Per Esperanto tra la mondo”.

Mi ne scias, ĉu sukcesis lia danĝera vojaĝo tra la Mondo, sed la renkontiĝo kun fervojisto-esperantisto estis interesa, plena de solidareco. Unuan fojon mi aŭdis Esperantan parolon kun nekutima por mi prononco.

Ŝajnis prospero kaj sukceso de nia lingvo en la mondo. Mi estis junkomunisto kaj havis specialan uniformon similan al Telman-taĉmentoj. Mi fiere portis apud la junkomunista insigno ankaŭ Esperantistan verdan steleton.

Sed aperis la ĉefa danĝero de l’ homaro – la germana faŝismo. La sinistra figuro de Adolf Hitler jam minacis al popoloj. Internaciismo de Esperanto kaj naciismo estas malkoincidaj.

Disiĝis nia esperantista trio. Jen malaperis Matvijenko, sed Zoja Dmitrijevna Skvorcova ĝis la morto agadis kiel vigla esperantistino, kaj ŝi sole renovigis E-klubon kaj E-movadon post la milito en nia urbo.

V.Ŝadrin, 22.04.1990

FORPISIS M.S.ABOLSKAJA

La 19-an de marto forpasis dumviva membro de REU Meri Solomonovna Abolskaja (1929-2008). Ŝi loĝis en Sankt-Peterburg kaj dum preskaŭ duonjarcento instruis Esperanton ĉeeste kaj koresponde. Ŝi verkis E-lernolibron, kiun uzis kaj uzas multaj instruistoj kaj E-lernantoj en nia lando. Ŝi preparis kaj eldonis memorlibron pri la fama aktoro kaj esperantisto Nikolaj Ritjkov “Sub la signo de Liro kaj Verda Stelo”. Mortis homo trankvila kaj modesta, kiun amis ĉiuj ŝiaj E-lernantoj kaj samideanoj-esperantistoj. Nia movado perdis homon, kiu dediĉis al Esperanto sian vivon. Ŝi ne multe parolis, sed multon faris. Ni devas fieri, ke inter ni estis tia homo.



“MEMORE PRI LJONJA BORISOV”

Pereis la voĉ’ el nia junio...

Kiom plu daŭros nia viv’?..

Ne multe nombris ni ja kune...

Ĉiujn kunigis la motiv’!..

Plu naĝos nuboj, blovos ventoj...

En mondon venos plu maten’...

De l’ aŭtoj fluos plu torentoj...

La vivo hastos sen reten’...

Ho! Vojoj... vojoj kaj eventoj...

Kaj vivoĝoj de l’ somer’...

Kaj lignofajro antaŭ tendoj...

Ja iam estis en la ver’...

Aere flustras pinarbaro...

Ŝajnsongoj de la melodi’...

Streĉitajn kordojn de l’ gitaro

Prilumis ora!... sunradi’!..

Viktor Ĉaldajev (Barnaul)

¹ Ĉi tiu gravega mekanismo (*germ.*)

Bulteno de REU

REU EN LA PASINTA JARO

(kvazaŭraporto)

Pasis pli ol jaro ekde la reelekta Konferenco de REU, kiu okazis en Tiĥvin. Kiel estis raportite, dum tiu Konferenco estis elektita nova Estraro – kun la malnova prezidanto. La konsisto: Andrej Grigorjevskij, prezidanto (Ŝumerlja), Nikolaj Gudskov, vicprezidanto (Moskvo), Vladimir Bespalov (Soĉi), Irina Gonĉarova (Odincovo), Konstantin Ĥlizov (Irkutsk), Jurij Karcev (Uljanovsk), Aleksandr Osokin (Sankt-Peterburg), Valentin Seguru (Moskvo).

Retrorigardante, mi devas konfesi, ke la agadjaro estis samtempe tre sukcesa kaj tre malsukcesa. Unuflanke, okazis du gravaj aranĝoj (mi listigas laŭkalendare):

La konferenco pri propedeŭtika instruado de Esperanto, aprilo 2007, estis rimarkebla evento por Esperantujo kaj por amaskomunikiloj. REU estis rekte envolvita en la preparado, kvankam ne kiel ĉeforganizanto.

RET-07 kunvenigis rekordan kvanton da partoprenantoj (183), fariĝinte la plej amasa interna rusia E-aranĝo en la nova jarmilo.

Aliflanke, krom tio apenaŭ eblas pri io fanfaroni. Honeste dirante, eĉ la supre menciitaj aranĝoj estis ekplanitaj kaj baze preparitaj en la antaŭa laborperiodo. La kulpo pri la neaktivado sendube estas mia. Mi povas parte pravigi min, ke mi malŝanis preskaŭ tutan pasintan jaron – nenio serioza, nur kronika bronkito, nekuracita ĝustatempe – sed sufiĉe formanĝanta la fortojn. En la plej kriza momento, en junio 2007, mi petis la Estraron pri demisio, bedaŭrinde, oni tion ne akceptis.

REU-membraro rekorde kreskis en 2007: aldone al 49 dumvivaj membroj la kotizojn pagis 118 individuaj membroj kaj 16 familiaj. Sentebla kresko okazis pri la aligitaj membroj: la kotizojn pagis 14 kolektivoj, konsistantaj el 221 personoj. Entute en 2007 al REU aliĝis 406 personoj. Rememorante riproĉojn de Viktoro Aroloviĉ (*REGo* № 6(43), decembro 2007, p. 17 – *Red.*) necesas aldoni, ke inter la kotizpagintoj estis 12 personoj, kiuj dum 2007 ankoraŭ ne iĝis 18-jaraj (kaj ankoraŭ 5, kiuj atingis la aĝon dum la jaro). Do, laŭ nia Statuto (konforma al la rusia Leĝo pri sociaj unuiĝoj) ĝis atingo de la plenaĝeco ili formale ne estis membroj, sed kandidatoj. REJM, la junulara sekcio de REU, malgraŭ absoluta neaktivado, same atingis rekordan membrokvanton (139 membrojn).

Por la aŭtuno 2007 kaj vintro 07/08 la solaj menciindaj agadoj de REU estis longaj serĉadoj de bazejoj por la someraj aranĝoj en 2008. Okazis ankaŭ asista agado por helpi al ĉeboksaranoj okazigi EoLA-n. La bazej-serĉado plene fiaskis en Rusio: troviĝis neniun konvena bazejo por okazigi RET. La variantojn reokazigi la aranĝon en iu el la jam uzitaj bazejoj ne subtenis la konsultitaj aktivuloj – el la kutimaj vizitantoj de RET. Rezulte ni devis koncentriĝi pri nia internacia aranĝo: Internaciaj Esperanto-tagoj en Krimeo. La varianto entute estas tre alloga, kun

multaj avantaĝoj, sed, bedaŭrinde, ekzistas ebleco, ke iuj rusianoj ne volos/ne povos tien iri pro teknikaj problemoj (kiel manko de valida eksterlanda pasporto). Por IET estis produktita kolora informilo, kiu presiĝis fine de februaro. Jam pli frue la tekston de la informletero aperigis REGo. Estis lanĉita retpaĝo kaj reta aliĝilo. Por tiu ĉi momento al la aranĝo aliĝis pli ol 60 personoj el deko da landoj.

Kurante pri UK-invitado. Daŭre okazis kaj okazas laboroj por inviti Universalan Kongreson al Rusio. La nuna “ĉefa dato” estas 2010. UEA konsentis konsideri nian kandidatecon kiel rezervan por tiu jaro (laŭ la propraj planoj de UEA, en tiu jaro oni volus kongresi en Ameriko). En majo 2008 estas antaŭvidata vizito de la Ĝenerala Direktoro de UEA Osmo Buller al Rusio. Estas planate, ke li renkontiĝos kun reprezentantoj de la Moskva registaro kaj kun rusiaj E-aktivuloj por taksu la pretecon de Rusio akcepti la forumon. Niaj ŝancoj por 2010 estas ne tre altaj, sed ne nulaj. Rusio kaj ankaŭ Moskvo havas grandegan deficiton de internacnivela hotellokoj, niaj prezoj estas tro altaj por la ofertata kvalito ktp. Sed siajn problemojn havas ankaŭ Kubo, kiu estas la ĉefa kandidato. Multo dependos de la financa kaj organiza helpo, kiun konsentos doni Moskva registaro. Sed ĉiukaze, eĉ la negativa rezulto ne estos katastrofo: do, ni havos pli da ŝancoj kaj pli da morala rajto por kandidati por la sekvaj jaroj. Eble intertempe oni ankaŭ konstruos pli da hoteloj kaj la prezoj iĝos pli moderaj kaj la servoj pli kvalitaj.

REU pli kluba kaj malpli individua. Malgraŭ relativa neaktiveco de REU en 2007 ĉi-jare la membroj re-aliĝas al la Unio eĉ iomete pli aktive ol pasintjare (kiam al REU aliĝis rekorda kvanto da membroj en la tuta rusia historio de la Unio). Fine de marto 2008 REU jam havas je deko da aliĝoj pli ol en la sama periodo pasintjare. Samtempe, necesas noti, ke la kvanto de individuaj membroj estas malpli granda ol pasintjare. Kaj la aligitaj membroj plimultiĝas: al REU jam aliĝis 15 kolektivoj – kompare kun 14 en la pasinta jaro.

Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja)

JAPANIO SUVERENA EN LA UEA-MEMBROSTATISTIKO

La Jokohama UK faris el Japanio superpotencon en la membrostatistiko de UEA en 2007. La nombro de individuaj membroj en la pasintjara kongreslando pli ol duobliĝis: el 410 en 2006 al 858. Kun 991 aligitaj membroj Japanio liveris entute 1849 membrojn de UEA kaj gajnis la unuan lokon ankaŭ en la suma statistiko de ambaŭ specoj de membreco.

En multaj landoj la efiko de UK al la membriĝoj estis minusa. En 2007 estis entute 6011 individuaj membroj; en 2006 ili estis 6066. Perdis precipe la landoj, kie la Florenca UK akcelis membriĝojn en 2006, i.a. Francio (-121), Italio (-84), Hispanio (-43) kaj Svislando (-30). Tamen, la ĝenerala malkresko okazis ne pro UK sed pro tio, ke IJK estis malpli granda ol en 2006. La malplimultiĝo de junaj (malpli ol 30-jaraj) membroj estis pli granda ol la ĝenerala malkresko. La nombro de junaj individuaj membroj de UEA – samtempe individuaj membroj de TEJO – estis 394 (-121). En 2008 TEJO tamen denove antaŭvidas pli grandan IJK kaj sekve ankaŭ rekreskon de siaj individuaj membroj.

- Mia edzino havas aĉegan memoron.
- Ĉu ŝi ĉion forgesas?
- Ne, ĉion memoras!

La distribuo inter la diversaj kotizkategorioj estis: Membroj kun Gvidlibro 386 (375 en 2006), Membroj kun Jarlibro 1468 (1308), Junaj Membroj kun Jarlibro 229 (342), Membroj-Abonantoj 2825 (2862), Junaj Membroj-Abonantoj 128 (132), Dumvivaj Membroj 809 (824), Junaj Dumvivaj Membroj 24 (25), Dumvivaj Membroj kun Jarlibro 58 (50), Junaj Dumvivaj Membroj kun Jarlibro 13 (16), Honoraj Membroj 63 (64), Membroj de Honora Patrona Komitato 8 (8).

Apud Japanio, almenaŭ 100 individuajn membrojn liveris Francio (548), Germanio (514), Brazilo (344), Usono (330), Nederlando (249), Italio (204), Svedio (164), Finnlando (156), Rusio (151), Britio (149), Belgio (148), Hispanio (143), Ĉinio (141), Hungario kaj Pollando (po 100).

La nombro de aligitaj membroj estis 11477 (-255). Temas pri tiuj membroj de la aliĝintaj landaj asocioj, kiuj ne estas individuaj membroj de UEA. Kun 1051 aligitaj membroj la landa asocio de Ĉinio sola superis la limon de 1000. Sekvis la asocioj en Japanio (991), Germanio (763), Italio (737), Belgio (513), Pollando (500), Britio (391), Usono (385), Francio (332) kaj Svedio (326). La aliaj asocioj pagis por malpli ol 300 membroj. Inter la aligitaj membroj tiuj malpli ol 30-jaraj estas samtempe aligitaj membroj de TEJO. Ili nombris 1979, kio signifis malkresketon je 20 membroj.

La tuta membraro de UEA, t.e. individuaj kaj aligitaj membroj kune, estis 17488. En 2006 ĝi estis 17798; sekve okazis malkresko je 310. Daŭras do la fala tendenco. Dek jarojn pli frue, en 1997, UEA havis 20131 membrojn, kiuj konsistis el 7113 individuaj kaj 13018 aligitaj membroj.

Ĉefe pro la malkresko de individuaj membroj, falis ankaŭ la nombroj de pagitaj abonoj al la revuoj de UEA kaj TEJO. La oficiala organo de UEA, “Esperanto”, nombris 4017 pagitajn abonojn (-72), kaj la socikultura revuo de TEJO, “Kon-takto”, 745 abonojn (-148). Laŭlanda statistiko de la membraro de UEA troveblas en la aprila numero de “Esperanto”.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

ESPERANTO EN LA UNESKO-RETEJO

Danke al la nova atento de UEA al la agado de Unesko kaj la aktiveco de UEA por diskonigi la Internacian Jaron de Lingvoj, celebratan ĉi-jare, Unesko afiŝis en sia retejo ankaŭ Esperantan tradukon de la deklaro de la Ĝenerala Direktoro de Unesko, s-ro Koichiro Matsuura, pri tiu speciala jaro de UN kaj Unesko. En multaj landoj aktivuloj de UEA ludis rolon por atentigi la naciajn komisionojn de Unesko kaj aliajn oficialajn instancojn pri la Jaro, kaj komunaj aktivaĵoj estas planataj. Esperantistoj ankaŭ laboris por traduki la deklaron de Matsuura al diversaj lingvoj.

La deklaro de Matsuura en Esperanto k.a. lingvoj troviĝas ĉe: http://portal.unesco.org/culture/en/ev.php-url_id=36000&url_do=do_topic&url_section=201.html.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

Osmo Buller, la Ĝenerala Direktoro de UEA, vizitis Kubon de la 2-a ĝis la 9-a de februaro laŭ invito de Kuba Esperanto-Asocio. La celo de lia vizito estis esplori la kondiĉojn por okazigi la Universalan Kongreson de Esperanto en Havano en la jaro 2010. Kun subteno de ŝtataj, urbaj kaj turismaj aŭtoritatoj KEA invitas la esperantistan mondrenkontiĝon al Kubo jam por la dua fojo. Unuafoje UK, la 75-a, sukcese okazis en la kuba ĉefurbo en julio 1990.

Buller renkontis funkciulojn de diversaj instancoj, kies sinteno al la reokazigo de UK estas tre entuziasma. Li estis akceptita i.a. de s-ro Fernando Rojas, vicministro pri kulturo, kaj s-ro Conrado Martínez, prezidanto de la Kuba Kongresa Bureauo kaj antaŭe urbestro de Havano. Krome li renkontis funkciulojn de la Ministerio pri Turismo, Kuba Libroinstituto, Fremdlingva Eldonejo José Martí, la nacia flugkompanio Cubana kaj Radio Havano. Grava estis la rekonatiĝo de Buller kun la kongresejo, kiu en 1990 donis perfektajn kondiĉojn por la UK. Intertempe ĝi estis renovigita, kun alkonstruo de hotelo, kie la kongresejo disponas pri pliaj salonoj. La Ĝenerala Direktoro vizitis multajn hotelojn kaj restoraciojn, admirante la multobliĝon de ilia nombro kaj entute la radikalan disvolviĝon de turismo en Kubo dum la pasintaj 18 jaroj.

Dum la vizitoj al unuopaj lokoj Buller estis akompanata de estraranoj de Kuba Esperanto-Asocio. Buller ankaŭ kunsidis kun praktike la tuta estraro de KEA dufoje en la bela sidejo de la Asocio. Surpriza kaj agrabla estis la konatiĝo kun s-ro Abdel Fattah Ezzeldin, ambasadoro de Egiptio, kiu lernis Esperanton en 1982 en Budapeŝto. Li invitis Buller kun reprezentantoj de KEA al sia rezidejo por vespermanĝo, kiun ĉeestis ankaŭ la ambasadoroj de Jamajko, Kamboĝo kaj Pollando, honora konsulo de Finnlando, direktoro de la oficejo de Unesko por la Kariba regiono, kaj prezidantino k.a. funkciuloj de la Nacia Unesko-Komisiono de Kubo. Dum la vespero la ambasadoro pruviĝis lerta pledanto por Esperanto, kiu kun siaj Esperanto-kolegoj kompetente respondis al plej diversaj demandoj de la neesperantistaj gastoj.

Ĵaŭdon, la 7-an de februaro, okazis en la teatro de la Nacia Biblioteko José Martí simpozio pri la 100-jariĝo de UEA, kun partopreno de ĉ. 100-kapa publiko. La festparolanto estis Osmo Buller, kiu laŭdis la simpozion kiel “eble la unuan grandan aranĝon omaĝe al la jubileo de UEA”. Pri sia esperantisteco kaj idealoj kaj avantaĝoj de la lingvo verve parolis ambasadoro Abdel Fattah Ezzeldin. Prelegojn pri la historio de la movado en Kubo kaj ĝiaj ligoj kun UEA faris la prezidanto de KEA Julián Hernández Angulo, kunordiganto de la Amerika Komisiono de UEA Maritza Gutierrez González, kaj la estraranoj de KEA Juan Ramón Rodríguez kaj Alberto Fernández-Calienes Barrios. Kiel omaĝon de la kuba esperantistaro al la forpasinta Claude Piron aktorino Yoandra Isabel Rodríguez deklamis lian poemon “La sufero de l’ aliaj”. Poemojn de Aquiles Nazoa kaj L.L.Zamenhof deklamis aktorino Georgina Almanza.

Lige kun esploroj pri estontaj UK-oj la Ĝenerala Direktoro de UEA havas en sia vojaĝplano almenaŭ Moskvon, kien li planas iri en majo.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Agapov Anton (Sankt-Peterburg), Aĥmetova Faina (Ivanovo), Aleksandrova Irina (Hant-Mansia reg.), Andrejsons Sergej (Sankt-Peterburg), Basov Gennadij (Moskvo), Blinov Aleksandr (Ĉeboksari), Bronštejn Mikaelo (Tiĥvin), Burgar Lilija (Volgodonsk), Ĉuprakova Nina (Moskvo), Edelŝtejn Vladimir (Moskvo), Gorŝkov Miĥail (Niĥnij-Novgoroda reg.), Griŝin Maksim (Moskvo), Ĥrustaljev Aleksandr (Dimitrovgrad), Jaĥina Alla (Krasnojarsk), Jaroŝenko Jelena (Volgodonsk), Jerkin Oleg (Kovrov), Kapitonova Jekaterina (Ĉeboksari), Kolodin Miĥail (Sankt-Peterburg), Kostina Jelena (Niĥnij Novgorod), Kovaljova Valentina (Novosibirsk), Kozlov Aleksej (Niĥnij Novgorod), Krasnokutskij Anatolij (Moskvo), Kudrjavcev Viktor (Jekaterinburg), Kuznecov Miĥail (Tiĥvin), Liĉavko Eŭgeno (Minsk), Liskov Andrej (Moskvo), Loskutova Tatjana (Ivanovo), Malej Ljubovj (Ivanovo), Milner Aleksandr (Moskvo), Morev Aleksandr (Sankt-Peterburg), Muraŝev Aleksandr (Sankt-Peterburg), Obrazcov Konstantin (Tomsk), Obrezkov Andrej (Ivanovo), Samodaj Vladimir (Moskvo), Smetanina Svetlana (Moskvo), Sokolova Evelina (Krasnojarsk), Sudakova Aleksandra (Dimitrovgrad), Surnakin Anatolij (Moskvo), Ŝevĉenko Aleksandr (Moskvo), Terjoĥin Vladimir (Jekaterinburg)

FAMILIAJ MEMBROJ

Blinova Julija (Ĉeboksari), Kozlova Jana (Niĥnij Novgorod), Kudrjavceva Rafija (Jekaterinburg), Loskutova Maja (Ivanovo), Mironova Irina (Moskvo), Muraŝeva Varvara (Sankt-Peterburg), Puŝkarskaja Valerija (Dimitrovgrad), Ŝevĉenko Dmitrij (Moskvo), Ŝevĉenko Jelena (Moskvo)

ALIGITAJ MEMBROJ

Junulara Esperanto-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko (JEAĈR) (5 membroj): *Belkin Jevgenij, Ivanov Aleksandr, Jermilova Alla, Nikitina Nadejda, Zaikina Jekaterina*

Esperanto-klubo de Ĉusovoj (Perma regiono) (10 membroj): *la listo dume mankas*

E-klubo de Jelec (12 membroj): *Gorjaĉiĥ Jekaterina, Maĉiĥina Aljona, Merenkova Tamara, Noskova Olesja, Orlov Aleksandr, Razumejkina Irina, Romanjuk Jurij, Ŝadrikova Aljbina, Veliĉko Tatjana, Zubarev Dmitrij, Zuev Vladimir A., Zuev Vladimir V.*

Moskva E-klubo "EK MASI" (+ 6 membroj): *Kokorev Dmitrij, Ljovuŝkina Jekaterina, Nujanžina Marija, Olejnikova Julija, Sigova Jana, Stepanov Andrej*

Murmanska E-klubo "Murmano" (+ 3 membroj): *Borisov Dmitrij, Levaja Maja, Novikova Nina*

Samara E-Organizo (15 membroj): *Agafonova Ljudmila, Aleksejeva Olja, Alforova Jelena, Aljakina Ljudmila, Balabancev Maksim, Fejgin Igorj, Kaplun Jelizaveta, Koĉergina Rimma, Korĥov Jevgenij, Kuznecova Jelena, Lisijenкова Valentina, Medvedeva Natalja, Prilepskaja Marija, Purigina Emilija, Suslov Vjaĉeslav*

Tiĥvina Esperanto-Klubo (11 membroj): *Baraŝkov Vasilij, Belova Tatjana, Bistrova Margarita, Kaĉalova Zoja, Kirjakov Anton, Koroteĉkij Aleksandr, Rajskaĵa Natalja, Tiĥomirova Olĵa, Vlasova Darja, Vlasova Vera, Zdrogova Nadeĵda*

REU dankas pro la donacoj al: Maksim Griŝin (Moskvo) – 160 rub.; Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin) – 120 rub. (por REJM)

E-klubo de Uljanovsk (9 membroj): *Abramov Sergej,*

Antoŝkina Aleksandra, Ĵuravljova Jekaterina, Kaĉalov Ivan, Karceva Margarita, Karceva Marija, Muĥina Jevgenija, Sirotinina Olĵa, Sĵabukova Olĵa

Vladivostoka E-klubo “Pacifiko” (17 membroj): *Abisova Ljudmila, Amelĉenko Izolĵa, Gorbunova Violetta, Karpeta Ljubovj, Koneva Galina, Malinovskaĵa Galina, Matvejenko Valentina, Neunilova Nadeĵda, Polŝina Galina, Suĥanova Galina, Ŝĉerutova Natalja, Ŝeremetjeva Svetlana, Ŝlepĉenko Gennadij, Tiŝĉenko Margarita, Titajev Aleksandr, Volkova Ljudmila, Zobkina Marina*

Volgodonska E-grupo “Stipo” (5 membroj): *Afanasjeva Jelena, Afanasjeva Aljona, Fajzulin Grigorij, Kotelĵnikov Aleksandr, Kotelĵnikova Jekaterina*

Volgograda E-klubo “Espero” (11 membroj): *Belozĵorov Nikita, Belozĵorova Jevgenija, Bikova Ljudmila, Dumler Vera, Dumler Aleksej, Jaŝĉuk Jekaterina, Spicina Valentina, Sukoĉeva Marija, Ŝaligina Marija, Taldikina Anastasija, Vtorova Tatjana*

Plena aktuala listo de la membroj troveblas en la ttt-ejo de REU laŭ la adreso <http://reu.ru/index.php?dok=membrolisto>.

KOTIZOJ DE REU/REJM POR 2008

Individua kotizo – 100 rub. (por Rusio kaj aliaj landoj de KŜŜ; por ceteraj landoj – 10 eŭroj), inkluzivas la membrokarton, Jarlibron/Manlibron de REU, REU-bultenon kaj aliajn informojn de REU, voĉdonrajton en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en aranĝoj de REU/REJM.

Dumviva kotizo – 2500 rub. (por Rusio kaj aliaj landoj de KŜŜ; por ceteraj landoj – 250 eŭroj) – ĉio la sama dum la tuta vivo.

Familia kotizo – 35 rub., por familianoj de membro paginta individuan aŭ dumvivan kotizon kaj loĝanta samadrese (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en aranĝoj de REU/REJM).

Rabatita individua kotizo – nelaborantaj gejunuloj kun la aĝo malpli ol 26 jaroj pagas 50% de la kotizo.

Subtenkotizoj (ĉio sama kiel por individua kotizo): *REU-subtenanto* – duobla individua kotizo; *REJM-patrono* – duobla individua kotizo.

Kolektiva membrokotizo – 35 rub. por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj), inkluzivas po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro/Manlibro de REU por ĉiu komenciĝinta deko de la aligitaj membroj, aliajn informojn de REU por la kolektivo; la membrokartojn, voĉdonrajtojn en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en aranĝoj de REU/REJM por la aligitaj membroj.

Aliĝkotizo – 200 rub., unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. La jamaj aliĝintaj

kolektivoj ne pagas ĝin. La nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se la organizaĵo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi estas konsiderata likvidiĝinta kaj poste devus denove aliĝi.

Rabatita abono de REGo – 200 rub. (ekster Rusio – 15 eŭroj), por ĉiuj membroj.

La dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon en 2001-2003, plu ricevados REGon sen aldona pago.

Rabatita abono de “Komencanto” – 180 rub. (nur en Rusio), por ĉiuj membroj.

Membri en REU oni rajtas ekde la aĝo 18 jaroj; 14-17-jaruloj rajtas aliĝi kiel kandidatoj.

Ĉiuj membroj de REU kun la aĝo malpli ol 31 jaroj aŭtomate iĝas membroj de la junulara sekcio REJM (Rusia Esperantista Junulara Movado) kaj ricevas voĉdonrajtojn en REJM-voĉdonoj.

Membroj de REU iĝas aligitaj membroj de Universala Esperanto-Asocio, la malpli ol 31-jaraj – ankaŭ de TEJO.

Aliĝilon, rublajn kotizojn kaj rabatitajn abonpagojn por REGo kaj “Komencanto” sendu (poŝtmandate) al: **Чертилову Михаилу Константиновичу, а/я 21, Одинцово-6, 143006 Московская область.** La eŭraj kotizoj pagendas al la konto **reua-p** ĉe UEA. (Pri pliaj pagmanieroj informiĝu ĉe Mikaelo Ĉertilov rete <membreco@reu.ru>, telefone +7-916-2019437 aŭ poŝte laŭ la supre indikita adreso.)

MALMODELA RABENO

En granda usona sinagogo jam tedis al la komunumanoj la loka rabeno, ne kapabla plenumi la postenajn devojn. Finfine la gvidantoj de la sinagogo sukcesis konvinki lin forlasi la postenon kontraŭ ricevo de tre varma rekomendo-letero.

En la letero ili komparis lin al Moseo, al Ŝekspiro kaj eĉ al la Eternulo.

Dank’ al tio sukcesis la rabeno ricevi bonan postenon en aliurba sinagogo.

Sed post kelka tempo la komunumanoj de la nova sinagogo malkovris la veron pri li. Tiam unu el iliaj gvidantoj telefonis al la prezidanto de la unua sinagogo kaj plendis: “Kial vi skribis pri li malĝustajn faktojn?”

Malnovsinagogano: “Kial vi diras tion?”

Novsinagogano: “Ĉar vi komparis lin al Ŝekspiro, Moseo kaj Dio, dum li malbone regas la anglan lingvon, apenaŭ konas la hebrean lingvon kaj kondutas malice, malhoneste kaj hontinde.”

Malnovsinagogano: “Ni nenion malĝustan skribis pri li! Ja li regas la anglan same kiel Moseo, konas la hebrean same kiel Ŝekspiro kaj krome, same kiel Dio, “li ne estas homo” (en la jida tio havas sencon “li ne kondutas kiel homo”).”

juda anekdoto de Josef Shemer

Eksciu, ke...

LA 5-a AZIA KONGRESO

La 11-an – la 15-an de februaro okazis la 5-a Azia Kongreso en Bengaluro (Hindio) kun la temo “Esperanto en multlingva Azio”. En ĝi partoprenis 160 personoj (aliĝintoj 254) el 29 landoj (el Azio 13, el ekster Azio 16). S-ro Lee Jung-kee el Koreio elektiĝis kiel la nova prezidanto de Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM). La 6-a Azia Kongreso okazos en junio 2010 en Ulaanbaatar (Mongolio). La plej granda Azia Kongreso (en Ĉinio en 1996) konsistis el 585 aliĝintoj el 18 landoj, do tiu ĉi bengalura Kongreso ne estis tiel granda kiel tiu, sed estis rekorda laŭ la prezentitaj landoj. En la antaŭaj AK-oj azianoj venis nur el Ĉinio, Japanio, Koreio kaj malmulte da aliaj landoj, sed en tiu ĉi Kongreso partoprenantoj venis el jenaj landoj: Bangladeŝo, Hindio, Ĉinio, Irano, Israelo, Japanio, Koreio, Mongolio, Nepalo, Pakistano, Srilanko, Taĝikio, Vjetnamio, do preskaŭ el ĉiuj landoj, kie ekzistas Esperanto-movado.

Plej multe da kongresaj aliĝis el Japanio (86), tamen ankaŭ multaj el ili (21) ne venis. El Hindio 35 aliĝis, sed tre bedaŭrinde nur malmultaj hindiaj junuloj estis en la kongresejo. Male el Nepalo 28 aliĝis, kaj ili tre energie kaj june laboris kaj agadis en la kongresejo. Jam tradiciaj Internaciaj Himalajaj Renkontiĝoj kaj la 4-a Azia Kongreso en 2005 antaŭenpuŝis la movadon. El Ĉinio 16 kaj el Pakistano 10 aliĝis, sed pro vizo-problemo duono el Ĉinio kaj neniu el Pakistano (krom unu loĝanta en Kanado) venis. Oni ne rajtas malhelpi pacamajn homojn agi por paco, sed la realo tion ne permesis. El ekster Azio venis 33 homoj. Dank’ al iliaj partoprenoj la kongreso estis pli internacia kaj certe profitis.

La kongresejo estis Kunvena Centro de Nacia Instituto pri Mensa Sano kaj Neŭra Scienco. La haloj estis tre taŭgaj por nia kunveno kaj krome la koridoroj kaj spaco ekster la haloj estis tiel larĝaj, ke ni povis libere uzi tiujn kiel budejojn kaj eĉ kunvenejojn. Ĉiuj rajtis ĝui la bankedon, tagmanĝi kune kaj teumi dufoje po 30 minutoj. Dank’ al la spaco kaj la libera tempo ni povis multe interamikiĝi.

Nacia Vespero konsistis el belegaj tradiciaj dancoj fare de profesiaj dancistoj, kaj la internacia Arta Vespero el amatoraj kantoj, muzikoj, dancoj kaj aŭkcio fare de la partoprenantoj. Okazis fakkunsidoj (entute 33) de la fakaj, konversaciaj, artaj, politikaj, edukaj, lingvistikaj ĝis KAEM-aj. En la koridoro partoprenantoj ĝuis japanajn paperfaldarton, kaligrafion, abakon kaj surpoŝkartan desegnadon.

La Inaŭguron prezidis s-ro Hori Jasuo, sed la Fermon – s-ro Lee Jungk-kee, ĉar dum la kongreso elektiĝis nova prezidanto kaj novaj anoj de KAEM. En la Fermo mongola reprezentanto s-ro Enkhlee Chimedtseren invitis la kongresanojn al la 6-a AK okazonta en junio 2010, kaj la nova prezidanto s-ro Lee laŭtvoĉe adresis sian laborplanon kaj deklaris la fermon de la kongreso.

Poste de la 16-a ĝis la 22-a okazis du postkongresoj: unu al nordo kaj alia al sudo. Jen estas mia persona impresio: *Mi ĝuis la renkontiĝojn.* Povi foje renkonti

unu la alian estas granda avantaĝo de esperantistoj. Inter fremdlandanoj malofte okazas re-renkontiĝo, sed inter esperantistoj tio estas tre ofta. Dum la lastaj 12 monatoj mi renkontis Indu el Nepalo trifoje: dum la Himalaja Renkontiĝo en marto, dum la Jokohama UK en aŭgusto kaj ĉi-foje. Tiamaniere en Esperantujo estas oftaj renkontiĝoj. Tiuj donas al mi grandan ĝojon.

Mi renkontis unuan fojon s-ron Zeiter Perera el Srilanko, s-ron Firdaus Ŝukurov el Taĝikio kaj s-ron Muhammad Mahbubul Huq el Bangladeŝo, kiujn mi konis per Interreto kiel verajn samideanojn, sed ĉi-fojaj renkontiĝoj kun ili donis al mi pli fortajn impresojn, naskinte en mi amikecon kaj solidarecon. En la kongresejo okazis tiaj renkontiĝoj tie kaj ĉi tie, kaj mi konstatis, ke tiaj estas la plej grandaj motoroj por progresigi la movadon.

Ĝis 2010, kiam okazos la 6-a AK en Mongolio, ni nutru amikecon pere de poŝto kaj Interreto, kaj en la kongreso eksplodigu la ĝojon de renkontiĝoj.

Fine mi dankas al LKK-anoj, kiuj klopodadis por la bela kaj sukcesa kongreso.

Hori Jasuo (Japanio)

LEĜPROPONO EN SVISLANDO FAVORE AL ESPERANTO

La politike altnivela apogo al Esperanto: la Nobelpremia kandidatigo de UEA fare de svisaj parlamentanoj (novembro 2007) – havas tre pozitivajn sekvojn en Svislando. Aperis politikistoj kiuj deziris fari ion por Esperanto. Rezulte de pretiga kunlaboro inter Svisa Esperanto-Societo (ĉefe Mireille Grosjean) kaj la iniciatintoj, Esperanto povus ricevi plian subtenon, agnoskon je ŝtata nivelo.

La 21-an de februaro leĝpropono estis submetita en la kanton (ŝtato) de Neŭŝatelo kun subskribo de 27 parlamentanoj el diversaj partioj. La leĝpropono listigas interalie jenajn punktojn: ŝtatnivele informadi pri Esperanto, utiligi ĝin en diversaj oficialaj dokumentoj (tradukoj), en turismo loka (prospektoj), ebligi kaj subteni la instruadon de la lingvo laŭ nedevisa formo.

Gazetara konferenco okazis en CDELI la 4-an de marto kun kelkaj el la 27 deputitoj. Ĉeestis Mireille Grosjean, kunprezidantino, kaj Stefano Keller, sekretario de SES.

(landa agado)

DU GRANDAJ MALAVANTAĜOJ

Tio okazis en la 19-a jarcento. Du judoj, ĝibulo kaj grandnazulo, veturis per ŝipeto de Odeso al Istanbul. Ĉiuj pasaĝeroj krom ili estis gojoj (= nejudoj). La grandnazulo, por kaŝi sian judecon, ne elbuŝigis eĉ unu vorton dum la tuta tago, kondutis plenge kaj deflankiĝis de la ĝibulo, por ke tiu ne rekonu lian judecon. Vespere li iris al iu fora angulo de la ŝipo kaj trovis tie la ĝibulon. Tute senintence ili komencis interbabili, kaj tiam la grandnazulo, “malfermiĝinte”, diris: “Mi malkaŝos al vi sekreton, sed mi petas vin ne rakonti ĝin al la aliaj pasaĝeroj: *mi estas judo.*” Diris la ĝibulo: “Inter ni, ankaŭ mi malkaŝos al vi ion, sed bonvolu gardi la sekreton: *mi estas ĝibulo!*”

juda anekdoto de Josef Shemer

 kultúra revuo

(100 jaroj de la librejo “Esperanto”)

Aleksandr Saŝarov

*REMEMOROI
DE CENTPROCENTA
ESPERANTISTO*

Aleksandr Saĥarov, ŝajne, estis senkonflikta homo. Ja post 1917, kiam li perdis ĉion: ejojn, entreprenojn, monon, li ne lasis Esperanton kaj ne okupis pozicion ofendiĝan aŭ malamikan. Junaj proletaj esperantistoj daŭre vaste uzis lian profesion sperton de eldonisto kaj instruisto. Tial mi volas oponi al beletra priskribo de ŝajnaj ambicioj de moskvaj esperantistoj gvidataj de A.Saĥarov en persekut-kampanjo kontraŭ A.Postnikov en romano de M.Bronŝtejn “10 tagoj de kapitano Postnikov”.

20

Peterburg: “Ni provincanoj iris al la kunveno por pliigi nian entuziasmon, sed foriris el ĝi kun malaj sentoj”. Monduma nobelo en blankaj gantoj Aleksandr Postnikov. Kio por li estis Saĥarov, tiu parvenuo el iu ursa angulo, el tiu... ĉu Ardatov? Eble en provinco Saĥarov estis “strobilo”, sed ĉi tie, en la metropolo, similaj instruistoj de matematiko amase vagadas tra Nevskij, ĉasante panon. Alia situacio estis en Moskvo. Same kiel nun, antaŭ cent jaroj la loĝantaro de Moskvo konsistis je 80% el venintoj el provinco aŭ el aliaj landoj. Por ili Saĥarov estis “la sia”, unu el ili.

Pacifisto, fervora adepto de demokratiaj liberecoj, subtenanto de la instruado de Lev Tolstoj, Saĥarov estis absoluta antipodo de Postnikov, batala oficiro, kiu verŝis propran kaj fremdan sangan por la Cara Regno.

Potenco de propraj entreprenoj, senambicia sinteno permesis al Saĥarov resti super la bataloj por gvidaj postenoj. Dum Postnikov estis devigata trakuri diversajn ŝtatajn instituciojn en serĉado de 100 rubloj por eldoni numeron de “Ruslanda Esperantisto”, Saĥarov nur dum la jaro 1910 vendis ĝis 100 000 ekz. de lernolibroj. La kvanto de abonantoj de “La Ondo de Esperanto” proksimiĝis al 2000. En la Librejo laboris 5 plene salajrataj oficistoj. Plensalajrata redaktoro de la revuo. Preskaŭ plene subtenata mone verkisto Devjatnin. Ses salajrataj instruistoj en la Instituto de Esperanto, kiuj gvidis 14 grupojn. Malfermo de Peterburgaj filioj de la Librejo kaj la Instituto.

Nur la mondmilito de 1914 bremsis akceliĝantan kreskon de ĉiuj entreprenoj de Aleksandr Andrejeviĉ Saĥarov, kaj postaj revolucioj ilin plene pereigis.


Mi opinias, ke en majo 1908 en nia lando estis fondita altprofesia E-Librejo, kaj tiu dato meritas esti akceptata kiel Tago de E-Libro en Rusio.

Aleksandr Ŝevĉenko (Moskvo)

NOVA POEMARO DE MIKAELO GIŜPLING

La eldonejo “Impeto” aperigis novan libron “Vespere” de unu el la plej elstaraj E-poetoj Mikaelo Giŝpling, eksa moskvano, nuntempe loĝanta en Israelo. La libro estas jam lia kvara poemkolekto, antaŭe aperis “El sisma zono” (1994), “Eola harpo” (1999) kaj “Tie ĉi tie” (2003). En la nova libro estas prezentitaj originalaj poemoj de la aŭtoro kaj liaj tradukoj el la rusa kaj germana lingvoj. Specifan parton de la poemaro konsistigas “En la arta galerio” – ciklo el 10 versaĵoj, verkitaj laŭ pentraĵoj de la fama rusa pejzaĝisto Isaak Levitan (ankaŭ la pentraĵoj mem estas presitaj kolore apud la koncernaj versaĵoj). Laŭ klarigoj de Mikaelo Giŝpling, legeblaj en la antaŭparolo, la versaĵoj “spegulas mian rilaton al la rusia naturo”. Laŭ mia opinio, la libro “Vespere” (same kiel aliaj libroj de Mikaelo Giŝpling) estas nepre leginda kaj havinda por ĉiuj ŝatantoj de poezio.

Garik Kokolija (Moskvo)



Per “Vojaĝo en Esperanto-lando” akademiano Boris Kolker fariĝis ĉampiono de la Esperanta libromarkato ankaŭ en la jaro 2007. Lia perfektiga kurso, kiu samtempe estas enkonduko en la Esperanto-kulturon, gajnis la unuan lokon jam en la sesa sinsekva jaro, kion sukcesis neniuj aliaj libroj dum tiuj pli ol 30 jaroj, dum kiuj la Libroservo de UEA aperigis furorlistojn de siaj vendoj. Ekde 2002 vendiĝis 2568 ekz. de la libro de Kolker; el ili 295 pasintjare.

Ĉi-kune aperas du listoj. Tiun de totalaj vendoj influas kvantaj mendoj de aliaj libroservoj. La alia listo dokumentas unuekzemplarajn vendojn al individuaj klientoj poŝte aŭ surloke en Roterdamo. En la listo de ĉiuj vendoj estas 11 eldonaĵoj de UEA/TEJO; en tiu de unuopaj vendoj ili estas 8 el 20. La vendoj en la kongresa libroservo estas enkalkulitaj en la statistiko de ĉiuj vendoj.

La adresaro de Pasporta Servo, tradicia rivalo de Kolker, vendiĝis en 276 ekzempleroj. La reeldono de “Vivo de Zamenhof” de Edmond Privat en redakto de Ulrich Lins, kvankam aĉetebla nur ekde aŭgusto, atingis la trian lokon (245). Ĝin sekvas “Lingvo kaj popolo” de Humphrey Tonkin (232), kiu siavice staras ĉe la pinto de unuekzemplaraj vendoj (44). Tre sukcesan lanĉon spertis la lernolibro de Stano Marček, “Esperanto per rekta metodo” (179). Ĝi aperis ankaŭ en multaj aliaj lingvoj, el kiuj la japana eldono, evidente dank’ al la vendado en UK, sukcesis eniri la liston de totalaj vendoj.

Ĉar diskoj kutime ne atingas furorlistojn, estas notinde, ke la abund-enhava “Esperanto elektronike” eniris la grandan liston por la dua fojo kun 111 vendoj. Ĝojiga estas ankaŭ la sukceso de la unua volumo de “Beletra Almanako”, kiu aperis sur la merkato fine de septembro sed malgraŭ malmulta tempo atingis la kvaran lokon ĉe unuopaj vendoj (34).

La vendoj sumiĝis je 121 172 eŭroj. Kompare kun la bona jaro 2006 okazis malkresko de 12 747 eŭroj pro la tradicie malpli bona debito de la kongresa libroservo, kiam UK okazas ekster Eŭropo. Hazarde la vendosumo preskaŭ precize egalas tiun en 2004, kiam la antaŭan fojon la UK okazis en Azio kaj la vendoj sumiĝis je 121 374 eŭroj.

Entute la Libroservo de UEA vendis 2214 diversajn titolojn. Nur de 84 el ili estis venditaj pli ol 10 ekzempleroj kaj 1080 vendiĝis nur en unu ekzemplero, dum 3306 titoloj allogis dum la jaro neniun klienton.

Antaŭ la titoloj troviĝas kvanto de venditaj ekzempleroj. Per * estas notitaj eldonaĵoj de UEA/TEJO. En la krampoj estas indikitaj aktualaj nerabatitaj vendoprezoj en eŭroj ĉe la Libroservo de UEA.

VENDOJ ENTUTE

295 “Vojaĝo en Esperanto-lando”, B.Kolker * (18,00)

Kruko post akcidento estas en malsanulejo. Kiam Baniko venas por viziti lin, li vidas grandegan karton kun la teksto “**Resaniĝu rapidege!**”

Baniko: Ha, tiu karto estas giganta. Kiu donis ĝin al vi?

Kruko: La flegistinoj.

(esperanto-anekdotoj)

- 276 "Pasporta Servo", listo de gastigantoj * (15,00)
 245 "Vivo de Zamenhof", E.Privat * (9,00)
 232 "Lingvo kaj popolo", H.Tonkin * (14,10)
 179 "Esperanto per rekta metodo", S.Marček (8,10)
 138 "Afero de espero", H.Goes * (9,00)
 137 "Saluton!", A.Childs-Mee * (10,80)
 113 "Internacia Kongresa Universitato 2007", red. A.Wandel * (12,00)
 111 "Esperanto elektronike", komputila DVD (9,00)
 109 "Gerda malaperis!", C.Piron (5,70)
 99 "La Komuna Eŭropa Referenckadro", div. aŭtoroj * (3,00)
 99 "Vikipedio – praktika manlibro", red. Y.Nevelsteen (3,00)
 90 "Historio por malfermi estontecon", div. aŭtoroj (15,00)
 89 "Pocket Esperanto Dictionary", A.McLinen * (15,00)
 84 "Mil unuaj vortoj en Esperanto", H.Amery (12,00)
 74 "Tyokusetuhou de manabu esuperanto nyuumon", S.Marček (7,50)
 73 "Plena manlibro de Esperanta gramatiko", B.Wennergren (27,00)
 72 "Japanio kalejdoskope", div. aŭtoroj (5,40)
 66 "Faktoj kaj fantazioj", M.Boulton * (13,80)
 55 "Konciza etimologia vortaro", A.Cherpillod * (21,60)

VENDOJ UNUOPAJ

- 44 "Lingvo kaj popolo", H.Tonkin * (14,10)
 43 "Pasporta Servo", listo de gastigantoj * (15,00)
 40 "Plena manlibro de Esperanta gramatiko", B.Wennergren (27,00)
 34 "Beletra Almanako 1" (10,50)
 33 "Vivo de Zamenhof", E.Privat * (9,00)
 27 "Plena ilustrita vortaro de Esperanto 2005" (87,00)
 27 "Vojaĝo en Esperanto-lando", B.Kolker * (18,00)
 26 "Esperanto per rekta metodo", S.Marček (8,10)
 25 "Konciza etimologia vortaro", A.Cherpillod * (21,60)
 25 "Afero de espero", H.Goes* (9,00)
 24 "Informado praktike", Z. van Dijk (15,00)
 22 "Biblio" (20,10)
 20 "Esperanto elektronike", komputila DVD (9,00)
 20 "Vikipedio praktika manlibro", red. Y.Nevelsteen (3,00)
 19 "Historio de Esperanto", A.Korĵenkov (12,00)
 19 "Relativeco per bildoj", W.Atkinson (9,30)
 19 "La Komuna Eŭropa Referenckadro", div. aŭtoroj * (3,00)
 17 "La bona lingvo", C.Piron (13,50)
 17 "2 paroladoj de Ivo Lapenna", vol. V, KD (13,50)
 17 "Esperanto kaj lingva diverseco", C.Hagège & F.Lo Jacomo * (2,70)
Gazetaraj Komunikoj de UEA

Dina Lukjanec

*Delonge mi vartis
revon konigi la poezion
de Dina Lukjanec al
rusiaj esperantistoj. Ĉu
ne estas konata? Laŭ
miaj scioj ne estas –
krom kelkaj
"Orakantaj" poemoj. Eĉ
la generacio
esperantista, sekvanta*



*post la mia, t.e. 40-45-jaruloj, nebule imagas la revan kaj fajnan, batalvokan kaj
delikatan mondon de la poetino. Loĝante dum jardekoj en malproksima, eĉ
eksterlanda urbo Almati, Dina plu kreadis brilajn poeziaĵojn kaj kantojn, sed ŝiaj
verkoj iĝis konataj nur por eta rondo de amikoj.*

*Post longtempaj miaj admonoj ŝi kuraĝis prezenti siajn verkojn al pli vasta
publiko. Kompilante nun poemlibreton de Dina Lukjanec, espereble, iom poste
eldonotan, mi ŝatus reklami ĝin per kelkaj poeziaĵoj, verkitaj en diversaj jaroj.*

Mikaelo Bronŝtejn

* * *

Ne rigardu min ne aprobante,
Kaj ne insultu forte Esperante, –
Ja mi scias, ke ĉi lingvon vi admiras,
Sed paroli Interlingve mi deziras.
Kaj ne pensu, ke Okcidental’
Estas nura mia ideal’, –
Diros mi al vi konfide,
Ke mi parolas ankaŭ Ide.
Pardonu min – tio ĉi ne estas fin’.

Ne rezervu longe mian preton,
Kaj traduku mian vi rideton.
Ĉu ekzistas la tradukoj por silento
Kaj paroloj de l’ aŭtuna vento?
Ĉu bezonas lingvon la rigard’
Kaj de la amanta koro ard’?
Do ne estu primitiva –
Ĉio taŭgas en la vivo,
Se la anim’ ion havas por esprim’.

* * *

Se vi povas, do kun ĉiuj estu por,
Kion sentas vi – ne diru,
Kaj ne gravas, ke sopiras via kor' –
Ĝi sopiru.

Se vi timas, ke faligos vin la frap',
Ne insistu, ke vi pravus,
Kaj ne gravas, kion pensis via kap',
Jes, ne gravas.

Kaj se forte vin interne ĝenas ord',
Kaj vi revas pri libero,
Do ne gravas, ke atendas vin la mort'
Pro la vero.

* * *

Tremanta stel' ne falu de l' ĉielo,
Por mi terura estos via fin'.
Ne lasu min enui en malhelo –
Nur via lum' varmigi povas min.

En mondo ĉi ĝojigas min nenio,
Ja luktas ĉiam bono kaj malbon'.
Mi devas scii ke ekzistas io,
Sen kio viv' malplena estas son'.

Mi vidas vin, kaj sango mia bolas,
Finbrulos vi – pereos mi sen cel'.
Do estu kaj trembrilu, se vi volas,
Trembrilu, sed ne falu de l' ĉiel'.

Falas la neĝo

Falas la neĝo trankvila kaj hela,
Kaj universo vastiĝas sen lim'.
Vivas Eterno kaj Amo plej bela
En la anim',
en la anim'.

Tio signifas, ke reĝas Spirito –
Kunas la Ter' kaj Ĉielo en preĝ',
Kaj ne necesas kaŝitaj militoj –
Falas la neĝ',
falas la neĝ'!

Falas la neĝ' post fenestro sencele,
Estas agrable troviĝi enflug'...
Vere, mi devas iame degeli,
Kaj vivi plu,
kaj vivi plu.

Tio signifas, ke malgraŭ degelo,
Ĉio en mondon revenos laŭ leĝ'.
Kaj por Eterno kaj Amo plej bela
Falas la neĝ',
falas la neĝ'!

Mikaelo Bronŝtejn

Elpensita amo

*(dek du poemetoj por ***)*

Skribaj' sur la vizitkarto

Vi tre plaĉas al mi – estas vero.
Sama vero, ke vi flugas for.
Tamen mi kun sincero
diru, ke ja protektos memor'

la dancadon kun ardo,
ĝojon de la rigardo,
revojn kun iluzi'...

Koran dankon al vi!
23.08.07

Eble

Eble, serĉanta inspiron,
sonĝas mi nun al subten' de
vi, kiu folan admiron
vekas en mi ekstermende.

Eble, impetas koncentre
mi por kompreni vin, kaj ne
palpi la vojon necerte
per meditat' tutsemajne.

Eble... sed venas la fido,
kiu entempe ne feblas,
ke ne tro foras revido,
ke en la viv' ĉio eblas.

05.09.07

Via voĉo

Mi kredas, ke mi vin bezonas –
sed kial?
Nur via voĉo milde sonas
en mia
eventoriĉa viv' necerta
kaj en la
matura koro, ami sperta –
sed sen la
sincera vorto ĝustesona –
velkanta...
do mi vin dankas, mia bona,
elkanta!

09.09.07

La vortoj

La vort', metita ĝustaloke,
efikas pli ol la hazarda.
Ĉu sonas voke aŭ provoke
la vort' de l' enamiĝo tarda?

Ĉu en la song' almenaŭ foje
vi rememoras min? Apenaŭ...
Vortumus mi eĉ jelpo, boje,
se trovus tion pli konvena

por komprenigi mian senton
al vi... al mi – unuavice,
ĉar mi hezitas kaj prudenton
alvokas damne kaj malice.

La vortojn trovi. L' pensojn formi.
Alie l' viv' ne bonas por mi.

10.09.07

Pluva bluso

Mi estas for
de prudentaj decidoj pri ia ekag',

vanuas el kor'
la deziro kompreni, ke daŭras la tag',
kaj vea venen'
plenigas bobele pokalon de l' sort',
kaj sonas en splen'
senpasia despero de blusa akord'.

Revenu vi home, vizie, fantome,
revenu en tuto eĉ nur por minuto
kaj restu kun mi!
Amata senfine, plej ĉarma virine –
en festoj, en plagoj, dum noktoj, dum tagoj
delekto por trista anim'...

Fluas la pluv',
gutoj lense grandigas ombregojn de l' nokt' –
jen estas la pruv',
ke ne lasos min jam la kutima sufok'
de larva real' –
same lense en larmoj grandiĝas vizi' –
ebriiga fatal'
tute dronas en bluso kun penso pri vi.

Aperu senbrue, mirakle kaj flue
sur nuba podio por la melodio,
por blusa paŝad'.
Al rev' efemera, glimante malvera,
loganta nin fore, tentanta amore,
nin blusas la pad'...

Cedas mallum' –
nuban tukon je flikoj disŝiris la vent',
telere la lun'
ŝvebas inter la flikoj de mia prudent',
kaj kreas gitar'
purajn sonojn post sombre sopira obtuz'.
Trankviliĝas mi, ĉar
eĉ se vi ne revenos, plu daŭros la blus'.

nov. 06 – sept. 07

Preskaŭ invito

Mi iĝos iam sobrul',
tedema avaĉo,
knarvoĉe pri morboj miaj
mi plendos dum nia kun', –

sed ardon de mia brul'
aprobas dume la aĝo,
kaj ridas okuloj viaj,
responde al miaj nun!

Plu daŭras iriza ir' –
aŭroroj septembraj
naskiĝas en bunt' kolora,
en fora arbara ben',
kaj pli ol plenaĝa vir'
pri siaj plagoj portempaj
forĝegas kun junco kora,
revante pri via ven'.

Juvele pretas por vi
manpleno da prunoj,
sincera regalo, predo
de mia ĝardeno vag',
kaj, malgraŭ ies envi',
ni ambaŭ restadas junaj
ĉe nia senzorga kredo
pri l' suno de nova tag'.

14.09.07

Amplitudo

Amplitudo de miaj pensoj
foje saltas ekster konscion,
aludante pri la atencoj
de l' racio ricevi ĉion.

Sen apudo, en pensa nudo
ne medito – traviv' ekstrema...
Vidu, estas ĝi amplitudo –
do, nature, – pensad' ekstrema.

25.09.07

Envio

Mi prenas liniilon kaj surmape
mezuras la distancon inter ni, –
ĝi estas kurta, – deksep centimetroj!
Ĉu kredi tion? Ŝatus la anim',
sed sobra penso frapas jam enkape,
ke l' tuta lando estas...
Sen komentoj

mi vidas gruojn flugi al la sudo,
mi vidas nubojn flugi al la sudo,
la sudon celas blanka spur' avia,
kaj mi envias...

27.09.07

Papilia aŭtun'

Papilia aŭtun'.
La aero plenplenas je revoj.
Adiaŭas anseroj –
kojno flugas al sud' super mi.
Kaj hezitas mi nun
inter miaj preferoj kaj devoj,
inter vero kaj vero, –
la realo kaj la iluzi'.

Ion kaŝas maten'.
Savas min konifera arbar' de
turmentiĝ' triviala
per amika humida brakum'.
Mi liberas, kaj sen
konsekvenca pensad', malsingarde,
sen serĉado kiala
simple paŝas al fora eklum'.

Ĉu naskiĝas la ver' –
absoluta, senduba, difina –
en senzorga paŝado,
en la pina kaj muska ekspir'?
Min alvokas sincer'
de l' malkaŝa rigardo virina,
kaj forestas la pado,
kiu gvidus al saĝa elir'.

29.09.07

Vespera saluto

Venas vesper'
kun tristo.
Mia esper' –
en disto.
Vastas la Ter',
la lando...
Gravas la ver':
ĉe l' rando

norda nun mi
ekrevas,
ke sude vi
nun levas
glasoj da vin'
je mia
stranga destin'
ebria.
Do ankaŭ mi
englutu
brandon kaj vin
salutu
en via varm',
elkora,
ho mia ĉarm', –
aj, fora!

06.10.07

La portreto

L' okuloj en via portret'
depende de la sunekbrilo
jen montras la grizon de ekmaltrankvilo,
jen bluon de via kviet'.

Kaj pensas mi en embaras'
pri la diferenco mistera:
ĉu en maltrankvil' aŭ kvieto ekstera
enestas bonŝanca okaz'?

Agordas mi spiron de l' sent'
kun la itinero de l' suno
por diri la vortojn, plej gravajn en nuno,
dum tiu konvena moment'.

Sed pace rondiras la sun'
sen kredi al ver' Galilea,
kaj fuĝas de mi la moment' malobea
al la sunsubira katun'.

Do kun senrezulta envi'
mi vane baraktas en reto...
ja antaŭ mi estas nur via portreto –
la muta fantomo de vi.

09.10.2007

Elpensita amo

Venis senatende
elpensita am' kaj
tristo ekstermende,
helaj revoj ankaŭ
volvis min inunde,
en la sentokirlo...
Ĝojis mi dumlunde
pro la am-akiro.

Amo neĉasita,
ĉasta babilado,
post ekzist' ermita
fajro kaj elan', do
sentojn el la fundo
levis mia koro
ĝis agrabla vundo –
ĝuo kaj doloro.

Mi eĉ ne rimarkis,
ne avertis saĝo,
ke la amo mankis
en la elpenŝaĝo.
Mi en la inundo
dronis malsingarde
ĝis la fin' de lundo,
kaj elplonĝis marde.

Per revelacio
la destin' min benis –
enamiĝo mia
tro rapide venis
al la adiaŭo
kun grinceto denta,
post trompita ravo,
ĝojo pormomenta.

Ĝis, adiaŭ, kara
elpensita amo!
Dolĉa kaj amara
estis via flamo.
Sed la kor' sufloras:
– Havas vi bontrovon –
elpensaj' jam foras,
do – elpensu novan.

okt. 07